

# Laŭzana Esperanto-Societo

Januaro  
2024



No 1

## Laŭzana Esperanto-Societo

p.a. ch. de la Vallombreuse 14  
CH - 1004 Lausanne  
sekretario@eo-l.ch  
+41 21 647 29 28

facebook.com/esperantolausanne  
youtube.com ... esperantolausanne  
dailymotion.com/esperantolausanne  
poŝtĉekkonto : CCP 10-26785-8

### Komitato 2023

#### Prezidanto :

Maryse Tissot (079 408 71 76)

#### Vicprezidanto :

Knud Sunier (079 210 97 75)

#### Sekretario :

François Randin (076 411 14 55)

#### Kasisto :

Françoise Pétermann (079 517 44 43)

#### Redaktoro :

Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

\*\*\*\*\*

Marde la 9<sup>an</sup> de januaro je la 20<sup>a</sup>  
en *Les Marronniers* en Vevey  
Maryse parolos pri  
“Memoraĵoj kaj gramatikaĵoj  
el Beneluksa kongreso”



Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe: [eventaservo.org/o/LES](http://eventaservo.org/o/LES)



**La komitatanoj bondeziras al vi ĉion bonan en 2024:**

La komitato atendas el la membraro iujn, kiuj konsentas organizi prelegon - ajna temo eblos – por unu el la monatkunsidoj venontjare.

Ankoraŭ: se vi posedas gastlokon sufiĉe spaca, bonvolu gastigi nin dum unu jaŭda **BABILADA RONDO**, kiam vi deziros en 2024.



## Babilada Rondo

ĵaŭde la 18<sup>an</sup> de januaro je la 19<sup>a</sup> ĉe

François Randin,

chemin de la Vallombreuse 14 en Lausanne

076 411 14 55 \* francisko@eo-l.ch

Proktologoj kiuj salutas  
unu la alian ... kolege



Espace Dickens, Lausanne  
**Ma la 6<sup>an</sup> de februaro**  
**Ĝenerala Asembleo**

Les Marronniers, Vevey  
**Ma la 5<sup>an</sup> de marto**  
Nia bibliotekisto parolos al ni pri la  
organizo de nia librarejo.

Espace Dickens, Lausanne  
**Ma la 2<sup>an</sup> de aprilo**  
**Decidota**

# ROBINSONO KRUSO

lia vivo kaj strangaj, mirindegaj aventuroj

parto 7

Mi nur povis ekkrii per la vortoj de la psalmo, "Tiu, kiuj veturas surmaron en ŝipoj vidas la faraĵojn de la Sinjoro en la profundaĵo. Ĉar, per Lia ordono la ventegoj levigās, la ventoj blovas kaj levas la ondojn; tiam, ili supreniras al la ĉielo; de tien, ili malsupreniras al la profundaĵo. Mia animo malfortiĝas, mi ŝanceliĝas tien kaj reen, kaj mi ne scias tion, kion fari, tiam la Sinjoro elkondukas min el ĉiuj miaj mizeroj."

Mi tiom ĝojiĝas, ke ĉio, kion mi povis fari, estis iri tien kaj reen sur la terbordo, jen levi miajn manojn, jen ilin faldi sur la brusto kaj danki Dion por ĉio, kion Li faris por mi, kvankam la ceteraj ŝipanoj pereis. Ĉiuj krom mi pereis, kaj mi estas sendanĝera! Mi nun rigardis la ĉirkaŭaĵon por eltrovi, kian lokon mi estis ĵetita, simile al birdo en ventego. Tiam ĉia ĝojo, kiun mi antaŭe sentis, forlasis min; ĉar mi estis malseka kaj malvarma kaj havis nenian sekan vestaĵon por revestigi min, nenion por nutri, kaj nenian amikon por helpi min.

Estis tie-ĉi sovaĝaj bestoj, sed mi ne havis pafilon, per kiu mi povis pafi ilin aŭ savi min de iliaj makzeloj. Mi nur havis tranĉilon kaj picon.

Nun mallumiĝis; kaj kien mi iros por pasigi la nokton? Mi pensis, ke la supro de ia alta arbo estos bona rifuĝejo kontraŭ danĝero; kaj tie mi povas sidi kaj pripensi pri la mondo, ĉar mi sentis nenian esperon de vivado. Nu, mi iris al mia arbo kaj faris ian neston por dormejo. Tiam, mi tranĉis bastonon por forpeli la sovaĝajn bestojn se iuj venos, kaj ekdormis kvazaŭ la branĉnesto estis lanuglito.



Estas hela taglumo, kiam mi vekigis, ankaŭ la ĉielo estas klara, kaj la maro trankvila. Sed mi observis tra la arbsupro, ke nokte, la ŝipo lasis la sablaĵon, kaj kuŝas mejlon (1.7 kilometrojn) de mi kaj la boato estas surtere du mejlojn dekstre. Mi iom laŭlongiris la terbordon por atingi la boaton, sed Golfeto de la maro larĝa unu mejlo min detenis de ĝi. Tagmeze, la forfluo tiom forkuris, ke mi povis proksimiĝi al la ŝipo; kaj mi eltrovis, ke se ni restadus ŝipbordon, ĉiu nun estus bone.

Tiupense, mi ploris; ja, mi ne povis alie fari; sed, ĉar tio ne helpos ion, mi pripensis, ke estos plej bone por mi naĝi al la ŝipo. Mi rapide senvestiĝis, mi saltis en la maron, kaj naĝis al la ŝipruino. Sed kiamaniere mi suriĝos la ferdekon? Naĝante ĉirkaŭ la ŝipo, mi ekvidis pecon da ŝnurego pendante tiel malalten ĝiaflanke, ke unue la ondoj kaŝis ĝin.

Per helpo de la ŝnurego mi surŝipiĝis.

Daŭrigota

Novembra kunsido: *Kreado de legendo*



## NASKIĜFESTO DE GILBERTO

Iam, kiam mi junagiĝis, mi rimarkis, promenante en arbarego, katon, kiu rajdantas unikornon. La kornĉevalino ŝajnis juna; ĝi estis blanka kaj gaja. Mi miris pri tiu eksterordinara spektaklo, ĉar ne kutimas renkonti katon sur ĉevalo. kiu havas ĉielarkkoloran voston.

Mi alproksimiĝis salutante ilin. Ĝentile ili ambaŭ salutrespondis kaj aldonis: «Ni iras al la kastelo. Ni devas rapidi, ĉar la reĝo senpacience atendas nian viziton, ĉar ni estas invititaj pro «la Festego de la naskiĝdatreveno de Gilberto».

Ili ekforiris, kiam mi laŭte vokis ilin, kriante: «Atendu, atendu min, mi volas akompani vin». La kato helpis min grimpi malantaŭ ĝin.

Mi feliĉegis, ĉar mi neniam eniris la kastelon, do estis bonega okazo.

Ĉe la kortenirejo atendis nin du katinoj, kiuj invitis nin eniri malfermante la pordegon. Jam oni povis aŭdi belegan muzikon certe ludite de simfonia orkestro. Ĝardene, multaj floroj kaj ornamaĵoj estis videblaj. Kia bela festo, mi mem pensis!

Ni ambaŭ grunden saltis kaj tuj la kato emfaze salutis la ĉefserviston, kiu proponis al ni eniri la kastelon. Ene troviĝis multege da nekonataj nobelaj invititoj sidantaj ĉe longa tablo; ĉeestis diversaj besttipoj kiel ŝafoj, kaproj, hundoj kaj anasoj. Ili tre bruais kaj la etoso bruemegis.

Meze de ĉiuj, ni rimarkis la reĝon havanta vizaĝon de krokodilo kaj flanke de li la reĝinon, kiu havas vizaĝon de hipopotamo. Apude de ili sidis la lia tuta familio. Ili kune, male ol kutime, "krokodilis".

Gilberto, kiel famgasto, sidis sur riĉa kaj ora trono. Sur la dancscenejo multaj gemusoj rondiris je la muzikritmo. Ili tre afable dancis kun katoj kaj katinoj.

Nia katamiko saltis sur la genuojn de Gilberto. Ĝi tre forte ronronis. Subite, ni aŭdis trumpetojn, kiuj anoncas la ekfestenon. Kelkaj ŝafoj alportis pladojn, kies vico da kuiristoj, unue, prezentis al Gilberto ... reverencante.

Ĉiuj atendis, ke la reĝo manlevante salutas Gilberton, por komenĉi manĝi.

Sed tuj Gilberto levigis el la trono por lavi siajn manojn. Tiu movo ne plaĉis al la nia kato, kiu planken falis el la genuoj de nia famulo, miaŭante laŭtaĉe kaj kolere. Feliĉe musino tuj venis por trankviligi ĝin. Do kiam la honorgasto revenis, ĉiuj kunmanĝantoj bonhumoris kaj aplaudis.

Finfine la festeno povis komenci. **Bonan apetiton al ĉiuj.**

Raportita de Maryse